

Manfred Hausmann,

## Adoro

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Kun nia reĝpotenco ni  
alrajdis pezakore.  
Tag-nokte neĝis ti ĉi,  
dum venis ni defore.

En la kabanon iras ni  
infanon ekvidante,  
nin klinas antaŭ tiu ĉi,  
la manojn kunfaldante.

La mirho estas tie ĉi,  
la or' kaj olibano.  
Ridetas vi, konfuzas vi  
nin tute, ho infano.

Alian ni ja kredis vin.  
Ni iras en malhelon,  
de l' kapo ni deprenas ĝin,  
de l' krono oran belon.

Ja ĉion, kion scias ni,  
la tutan homan scion,  
ne gravas tio ja por ni,  
forgesu ni ĉi tion!

La mio, kiu kreis sin<sup>2</sup>  
supere de aliaj,  
ho, kie ni nun trovu ĝin,  
ĉu en internoj niaj?

Ni klinas nin nun antaŭ vi,  
kun affikteco nia.  
Kaj nin klinante sentas ni:  
Mizer' finiĝas ĉia.

Jen skuas la ĉevaloj sin  
tintante sonorile.  
Sen bruo falas super ĝin  
neĝflokaj tre trankvile.

...

---

<sup>2</sup>aŭ:  
La "mi" kreinta iam sin

*Traduko de la Germana poemo “Anbetung” de MANFRED HAUSMANN (\*1898-09-10 – †1986-08-06) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04).*

*Arg-952-1921 (2014-01-10 16:21:40)*